

Фёдор Сологуб,  
Расточитель

Фёдор Сологуб,  
La disipulo

Фёдор Сологуб,  
La disipanto

*tradukita de Manfred  
Retzlaff*

*tradukita de Michel Duc Goninaz*

Измотал я безумное тело,  
Расточитель дарованных благ,  
И стою у ночного предела,  
Изнурен, беззащитен и наг.

Stulte mi eluzis korpon mi-  
an,  
Disipado estis tio ĉi,  
Vidas elirejon mi nenian,  
Nude, neŝirmite staras mi.

Mi la korpon liveris al ŝimo,  
Disipinte trezoron de l' sort'.  
Jen mi staras ĉe la noktolimo  
En nudeco, senhelpa, sen fort'.

И прошу я у милого Бога,  
Как никто никогда не просил:  
„Подари мне еще хоть немного  
Для земли утомительной сил.

Kaj mi preĝas al la kara Dio,  
-Tiel mi neniam petis Lin -:  
“Donu Vi al mi da energio  
iom, kiu plu vivtenos min.

Kaj mi petas de la Dia graco  
— senkomparas la preĝa sin-  
cer'! —  
“Nur iomon da forto donacu  
Al mi, kiun lacigas la ter'.

Огорченья земные несносны,  
Непосильны земные труды,  
Но зато как пленительны  
весны,  
Как прохладны объятья воды!

Neporteblaj afliktiĝoj teraj,  
Kaj tro granda tera vivo-  
pen',  
Sed kontraŭe ĉarmoj prima-  
veraj  
Kaj freŝiga akva  
ĉirkaŭpren'!

Sub ĉi-teraj ĉagrenoj mi skla-  
vas,  
Por mi troas la tera plenum',  
Sed printempoj min, ho kiom!  
ravas,  
Kaj freŝigas min akva brakum'.

Как пылают багряные зори,  
Как мечтает жасминовый куст,  
Сколко ласки в лазоревом взоре  
И в лобзании радостных уст!

Kiel ardas la purpur-  
aŭroroj,  
Kiel igas revu la jasmen',  
Kiel rave amas inaj koroj,  
Kiel kisas lipoj kun  
ĝojplen'!

Kiom ruĝe aŭroroj ĉi ardas,  
Kiel revas jasmena arbet',  
Kiel milde lazuro rigardas,  
Kiel kisas la lipa impet'!

И еще вожденней лобзанья,  
Ароматней жасминных кустов  
Благодатная сила мечтанья  
И певучая сладость стихов.

Kaj ankoraŭ ĉi kisas' pasia,  
1)  
Kaj jasmen-aromo tiu ĉi,  
La revado forta, idilia,  
Kaj de l' versoj dolĉa melo-  
di'!

Dezirata eĉ pli, ol kizado,  
Kaj aroma eĉ pli, ol jasmen',  
Estas forto de sonĝa persvado  
Kaj de versoj la milda refren'.

У тебя, милосердного Бога,  
Много славы, и света, и сил.  
Дай мне жизни земной хоть  
немного,  
Чтоб я новые песни сложил!“

Gloro kaj potenco estas via!  
Mi Vin petas, kompatema  
Di':  
Donu iom al vivtempo mia,  
Por ke pluajn kantojn verku  
mi!“

Ĉar Vi, Di', kompatemas, kaj  
vere  
En Vi — gloro kaj fort',  
lumoflu'.  
Donu iom da vivo surtere,  
Por ke kantojn komponu mi  
plu!”

...

...

...

*Verkinto de tiu ĉi Rusa poemo estas*  
 ФЕДОР СОЛОГУБ (*Fjodor Kusmiĉ*  
*Teternikov*, \*1863-03-01 – †1927-12-  
 05), publikigita 1917-06-13.

Arg-385-757 (2007-02-06 16:46:33)

*La vera nomo de la poeto estis:*  
 Феѡдор Кузьмич Тетерников (*Fjo-*  
*dor Kusmiĉ Teternikov*), Феѡдор  
 Сологуб (*Fjodor Sologub*) estis lia  
 kaŝnomo (*pseŭdonimo*).

*Traduko de la Rusa poemo*  
 “Расточитель” de ФЕДОР  
 СОЛОГУБ (*Fjodor Kusmiĉ Te-*  
*ternikov*, \*1863-03-01 – †1927-  
 12-05) en Esperanton de MAN-  
 FRED RETZLAFF (\*1938-11-  
 04) en 2002-08 .

MR-392-1a / Arg-385-758  
 (2007-02-06 12:17:32)

*La vera nomo de la poeto estis:*  
 Феѡдор Кузьмич Тетерников  
 (*Fjodor Kusmiĉ Teterni-*  
*kov*), Феѡдор Сологуб (*Fjodor*  
*Sologub*) estis lia kaŝnomo  
 (*pseŭdonimo*).

*Traduko de la Rusa poemo*  
 “Расточитель” de ФЕДОР  
 СОЛОГУБ (*Fjodor Kusmiĉ*  
*Teternikov*, \*1863-03-01 – †1927-  
 12-05) en Esperanton de MICHEL  
 DUC GONINAZ (\*1933-09.06) en  
 2003.

Arg-385-759 (2007-02-08  
 12:35:49)

*Tiu ĉi traduko aperis en la revuo*  
 “La ondo de Esperanto”, en 2003.  
 Laŭ sciigo de s-ro Michel Duc  
 Goninaz, la verkinto de tiu ĉi  
 traduko, mi, Manfred Retzlaff, ko-  
 rektis preseraron en la tria stofo,  
 nome “printempo” anstataŭ ĝuste  
 “printempoj”. S-ro Duc Goninaz  
 atentigis min pri tio per retletero  
 de l’ 07.02.2007. Tiu preseraro  
 ankoraŭ estis en la retejo [http:](http://www.esperanto.org/Ondo/Ondo/106-lode.htm#106-36)  
[//www.esperanto.org/Ondo/](http://www.esperanto.org/Ondo/Ondo/106-lode.htm#106-36)  
[Ondo/106-lode.htm#106-36](http://www.esperanto.org/Ondo/Ondo/106-lode.htm#106-36),  
 el kiu mi prenis la tradukon.